

Enhavo

Al la fontano klara	3	Kukolo	7
Apud mia blonda	21	Kukolo kaj azeno.....	7
Belmana.....	16	La aŭto de la ĉefo.....	10
Blovas la vent'	17	La avino motorciklas	10
Ĉe la luna lumo	18	La espero	23
Ĉu brasikon plantas vi? ..	13	La iamo longe for	15
Dancu, dancu	2	La kri'.....	8
Dek boteloj	12	La krokodilo.....	16
Du amikoj	4	Lasta tramo	18
En fojnamaseto	7	Liberas la pens'	20
En mia eta pomo	12	London ĉe mi.....	6
Erinaco	19	Mia korpo	9
Frato Ĵako	6	Muzikanto.....	9
Hieraŭ nur	8	Nin portis plu kaj plu.....	10
Himno de ĝojo	5	Onklino el Maroko	11
Jen ŝi iras	11	Pirueto, ternukseto	14
Jen via mondo.....	22	Pri koloroj	19
Ju pli ni estas kune.....	4	Se vi sentas nun kontenton..	20
Kampanino.....	5	Sur la pont' d' Avinjon'	14
Kanto de l' revido.....	15	Vent' printempa	2
Katoj, katoj	12	Veterokanto.....	4
Knabineto arbareton.....	2	Vivu la stel'	22

kantoj kaj kanzonoj
en la internacia lingvo

Esperanto



IIK 2007

Jacugatake, Japanio

18

Ĉe la luna lumo

El la franca, 17a jarcento, Parizo: "au clair de la lune"

Ĉe la luna lumo, lasu Pierot',
ke per via plumo skribu mi por not'. *
For kandelo mia, plu ne brulas flam': * *
min elasu vi ja pro la Dia am'! *

Ĉe la luna lumo diris Pierot': * * *
Mi sen skriboplumo kuŝas en dorlot'. *
Nian najbarinon iru peti tuj, *
ĉar ŝi la fajrilon batas ĉe l' fajruj'. *

Ĉe la luna lumo iris Arleken'
al la bela bruna, ŝi respondas jen:
Kiu frapas tie? Kaj rediras li:
Min enlasu pie pro la ama Di'!

Ĉe la luna lumo oni en malhel'
serĉas pri la plumo, serĉas pri kandel'.
Kion oni trovis, restis en nesci',
sed la pordon ŝovis ili ja post si!

Lasta tramo

Je la deka horo dormas nur mi en la lit'.
Sonoras ĉe la pordo – kia horo por vizit'!
Kiu staras ĉe la pordo? ... Policano!
Policano en pijamo kaj kion li diras al mi?
"Foriris lasta tramo, ĉu mi povas dormi ĉe vi?"



Je la dekunua horo dormas policano kaj mi en la lit'.
Sonoras ĉe la pordo – kia horo por vizit'!
Kiu staras ĉe la pordo? ... Elefanto!
Elefanto en pijamo kaj kion ĝi diras al mi?
"Foriris lasta tramo, ĉu mi povas dormi ĉe vi?"

Je la kvina horo dormas ... kaj mi en la lit'.
Sonoras vekhorloĝo DRINGG!
"Ĉiu ellitiĝu, ekiras unua tramo!"

7


Kukolo kaj azeno

El la germana

Disputon havis iam kukolo kaj azen'
kiu do plej bone kantas, kiu do plej bone kantas,
printempe je maten', printempe je maten'.

„Mi kantas plej bonege“, komencis la kukol',
Sed aliĝis la alia, sed aliĝis la alia
el plej profunda kol', el plej profunda kol'.

Do ambaŭ ĉarme kantis. Dissonis tra l' arbar'
la aminde belaj voĉoj, la aminde belaj voĉoj:
„kukukukuk ia, kukukukuk ia“.



Kukolo

Dezirante trinki haltis min de fonteto ĉe rand',
jen aŭdiĝis el arbara fon' de kukolo la kant'.

Refreno: Holala, holala tiria holala kuku (3x), holala tiria ho.

Diru al mi, kara kukolet', kie vi kaŝas vin,
diru al mi, kie estas nun mia koramatin'.

En fojnamaseto

El la franca « après de ma blonde »

Sen hejmo, sen monero, libera sub ĉiel', (bis)
vagadis mi sur tero, laŭ volo kaj sen cel'.

Refreno: En fojnamaseto, tiel bone, bone, bon',
en fojnamaseto bone dormas mi.

Dumvintre falas neĝo, somere brilas sun', (bis)
feliĉa kiel reĝo mi vagas sub la lun'.

Por mi blovetas vento, ondumas riveret', (bis)
por mi odoras mento, ruĝiĝas papavet'.

Pli riĉa ol riĉulo, ne timas ŝtelon mi, (bis)
trezor' de vagemulo valoras nur por li.

Dancu, dancu

El la slovaka

Dancu, dancu, ne staru, ne staru,
sed ke forno ne falu, ne falu,
vintre forno pli gravas, pli gravas,
liron ĉiu ne havas, ne havas.



Refreno: Tralalalala, tralalala, tralalala lalala lalala.

Staras gard' en hor' frua, hor' frua,
la soldat' en jak' trua, jak' trua,
de maten' ĝis tag' ruĝas, tag' ruĝas
malgraŭ ke lin ros' duŝas, ros' duŝas.

Vent' printempa

El la hungara

Vent' printempa kirlas akvon, floreto, floreto,
ĉiu bird' elektas paron, floreto, floreto.

Sed mi jam kiun elektu, floreto, floreto,
vi min kaj mi vin elektos, floreto, florteto.

Knabineto arbareton

El la pola

Knabineto arbareton iris kun la ĝoj',
iris kun la ĝoj', iris kun la ĝoj'
kaj renkontis ĉasisteton sur la sama voj',
sur la sama voj', sur la sama voj'.

Refreno: Tralala tralala ...

Ĉasisteto, samvoĵano, mi salutas vin,
mi salutas vin, mi salutas vin.
ci ricevus buterpanon, sed mi manĝis ĝin,
sed mi manĝis ĝin, sed mi manĝis ĝin.

La espero

Himno de Esperanto, L. L. Zamenhof

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko,
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.

Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion,
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.

Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la Esperantoj.

Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj.
Sed dissaltos la obstinaj baroj
per la sankta amo disbatitaj.

Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faras en konsenton
unu grandan rondon familian.

Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.

esperanto

La kri'

El la usona: "my bonnie is over the ocean"

Sur montoj kaj step' indianoj ĉasadas kun ruĝfamili',
kaj se vi postulas parolon, kanjono respondas per kri':

Refreno: Esperanto estas la lingvo por ni, por ni,
Esperanto estas la lingvo por ni!

En densa afrika ĝangalo sovaĝaj nigrujoj sen Di'
jam solvis la lingvan problemon per tamtam' disiĝas la kri':

Ĉe norda poluso eskimoj loĝadas en neĝa glaci'.
Se ili bezonas parolon, aŭdiĝas la tutsama kri':

Tra tuta ĉi vasta terglobo, en urboj de ĉiu naci'
troviĝas la samideanoj kaj sonas la tutsama kri':

Ruĝuloj, nigrujoj, eskimoj kaj avoj kaj knaboj kaj mi
jam uzas la Zamenhof-lingvon, do vivu, prosperu la kri':

Hieraŭ nur

El la angla: "yesterday", Beatles

Hieraŭ nur la ĉagrenoj estis en futur'
Ili venis nun kun malaŭgur', imagu, ke hieraŭ nur ...

Hieraŭ nur amo estis plaĉa aventur'.
Nun mi ĝin fuĝas kun terur', imagu, ke hieraŭ nur ...

Refreno: Nun ŝi iris for, jes sinjor', ien sen spur'.
Kaj mi revas plu pri la ĝu' de hieraŭ nur.

En moment' estas mi duono laŭ la sent',
nura ombro plena je lament', hieraŭ pasis en moment'.

Hieraŭ nur amo estis plaĉa aventur'.
Nun mi ĝin fuĝas kun terur', imagu, ke hieraŭ nur ...

Blovas la vent'

El la angla « Blowin' in the wind », Dylan - Pilger

Kiom da vojoj laŭiru la hom'
Ĝis estos li hom' laŭ merit'?
Jes ja! Kiom da maroj laŭŝvebu kolomb',
Ĝis ĝi dormos sur strando kun fid'?
Jes ja! Kiom da fojoj plu pafos kanon',
Ĝis ĉesos por ĉiam milit'?

Refreno: Respondon, amik', al ni blovas la vent'.
Respondon al ni blovas la vent'.

Kiom ĉielon rigardu la hom',
Ĝis vidos li pli ol la ter'?
Jes ja! Kiom oreloj plu taŭgas al li,
Ĝis aŭdiĝas plorad' de mizer'?
Jes ja! Kiom da mortoj konvinkos lin,
Ke tro multajn mortigis sufer'?

Kiom da jaroj ekzistu montar',
Ĝis laviĝos al maro ĝi?
Jes ja! Kiom da jaroj ekzistu homgrup',
Ĝis rompiĝos malam-tradici'?
Jes ja! Kiom, turnante la kapon, povas hom'
Pretendi, ke ne vidas li?



La avino motorciklas

El la germana: "Meine Oma fährt im Hühnerstall Motorrad"

La avino en kokejo motorciklas, motorciklas, motorciklas,
la avino en kokejo motorciklas, la avino estas tre moderna in'.

La avino sur la dentoj havas harojn, ...

La avino per piedo librojn legas, ...

La avino havas luman noktopoton, ...

La avino havas liton kun duŝejo, ...

La avino en mamzon' kaŝas pistolon,

La avin' en necesejo bredas musojn, ...

**La aŭto de la ĉefo**

Laŭ la angla: "Glory, glory halleluja"

Post la unua fojo oni anstataŭas unu post la alia la vortojn per gesto aŭ sono, ekz.
kantas «brm brm» por la aŭto, montras la radon, ktp.

La aŭto de la ĉefo havas truon en la rad', (3-foje)
ni riparu ĝin per peco de maĉgum'.

...

La ... de la ... havas ... en la ..., (3-foje)
ni riparu ĝin per peco de mjam-mjam'.

Nin portis plu kaj plu

El la ĉeĥa

Nin portis plu kaj plu rivera ondo, nin ĉirkaŭprenis arbara mondo,
nin portis plu kaj plu rivera flu'. (bis)

Remiloj kaj ŝipet' nur estas etaj, ĉu por reveno ni estas pretaj,
aŭ ĉu nin portu plu rivera flu' ? (bis)

Nin portis plu kaj plu ondet' petola, sub kiu ludas fiŝet' ne sola,
nin portis plu kaj plu rivera flu'. (bis)

La iamo longe for

Skota popolokanto

La prakonatojn ĉu ni lasu velki en memor'?
Ĉu ni ne pensu kare pri la iamo longe for?

Refreno: Iamo longe for, karul', iamo longe for!
Ni trinku en konkordo pro la iamo longe for!

La kruĉojn, do, ni levu kaj salutu el la kor'
Kaj trinku en konkordo pro la iamo longe for!

Montete iam kuris ni kaj ĉerpis el la flor'
sed penan vojon spuris post la iamo longe for!

Do, jen la mano, kamarad', ni premu kun fervor!
kaj trinku ni profunde pro la iamo longe for.

Kanto de l' revido

Ĉu ni disiru sen esper', sen espero al reven'?
Ĉu ni disiru sen esper', al nova rekunven'?

Refreno: Nur estas ĝis revido frat', nur estas ĝis revid'.
Ni certe rekunvenos frat'. Nur estas ĝis revid'.

Fermiĝu per la manoj nun sub nia verda stel'!
Fermiĝu per la manoj nun de l' am' plej bela ĉen'.

Do kunigitaj per la am' amikoj estu ni,
ligitaj kune per la ĉen' amikoj restu ni.

Ĉar vivos nia ideal' en vera amikec',
ĉar vivos nia ideal' por tuta estontec'.

Du amikoj

El Mazi en Gondolando

Kune mi kaj vi,
amikoj estas ni,
mi kaj vi, pli kaj pli,
amikoj estas ni.

Kune mi kaj vi,
amikoj estas ni,
mi kaj vi, pli kaj pli,
du amikoj ni.

Ju pli ni estas kune

Ju pli ni estas kune, jes, kune, jes, kune,
ju pli ni estas kune, des pli da simpati'.

Ĉar mia amik' estas via amik',
kaj via amik' estas mia amik' :
ju pli ni estas kune, des pli gajas ni !

**Veterokanto**

Hodiaŭ brilas la suno, kaj ho ni estas feliĉaj.
Ni kantas al la mondo: Bonan matenon, suna mond'.
Bonan matenon, suna mond'.

Hieraŭ pluvigis la pluvo, kaj ho ni estis feliĉaj.
Ni kantis al la mondo: Bonan tagon, pluva mond'.
Bonan tagon, pluva mond'.

Morgaŭ fulmotondros, sed ho ni estos feliĉaj.
Ni kantos al la mondo: Bonan vesperon, tondra mond'.
Bonan vesperon, tondra mond'.

Apud mia blonda

El la franca, Parizo, 17a jarcento: "auprès de ma blonde"

En la ĝardeno patra siringoj floras tri (bis)
Surteraj birdoj ĉiuj eknestas tie ĉi.

Refreno: Apud mia blonda, kiel ho! el ho! el ho!
apud mia blonda, ĝue dormas mi!

Surteraj birdoj ĉiuj eknestas tie ĉi. (bis)
La turto, la kardelo kaj bela la silvi'.

La turto, la kardelo kaj bela la silvi'. (bis)
Kaj mia kolombeto, kveranta milde pri.

Kaj mia kolombeto, kveranta milde pri. (bis)
Pri la fraŭlinoj, kiuj ne havas edzon, Di'!

Pri la fraŭlinoj, kiuj ne havas edzon, Di'! (bis)
Por mi ĝi ja ne kantas, ĉar belan havas mi!

Por mi ĝi ja ne kantas, ĉar belan havas mi! (bis)
Sed diru, belulino, nu, kie estas li?

Sed diru, belulino, nu, kie estas li? (bis)
Li estas, ve! kaptito, kaptit' en Germani'.

Li estas, ve! kaptito, kaptit' en Germani'. (bis)
Per kia mon' vi pagus, por ke revenu li?

Per kia mon' vi pagus, por ke revenu li? (bis)
Mi pagus per Versajlo, Pariz' kaj San-Deni'.

Mi pagus per Versajlo, Pariz' kaj San-Deni'. (bis)
La reĝa katedralo kaj nia vikari'.

La reĝa katedralo kaj nia vikari'. (bis)
Kaj mia kolombeto, por ke revenu li!

La krokodilo

Tradukis Lydia Zamenhof

La krokodil' irante al milito
al la idar' "adiaŭ" diris jus,
foriris ĝi muĝante kun ekscito
pri elefanto pensis ĝi kun ruz'.

Refreno: Se la kro-kro-kro, la kro-kro-kro, la krokodiloj
malaperis for el Nil' ni ne parolu plu
o-e o-o-e o-e o-o-o
o-e o-o-e o-e o-o-o

Murmuris ĝi militan marŝon glute
Inter la dentoj vortoj restis for
kiam la faŭkon ĝi malfermis tute
la malamikoj tremis en la kor'.

Ĉe nila bordo zumis ĝia kanto
kaj ĉio tremis ĉe la bord' de Nil',
sed jen subite venis elefanto
kaj malaperis brava krokodil'.



Belmana

El la angla "Greensleeves", trad. William Auld

Ho flor' gracia, trezor' radia, tenanta min en servuta ĉen',
neniam logos min dam' alia, ĉar belo kaj bono vin kronas.

Refreno: Belmana, ho dolĉa ben', Belmana kun korseren',
Belmana, ho suvereno, sindone al vi mi genuas.

Por vi tramonde mi plej volonte vojaĝus spite al mortfatal',
trezorojn serĉi sur ter' kaj sonde en maraj profundoj por vi nur.

Modeste pia kaj simpatia vi estas, ho mia sinjorin',
ĉe vi l' okul' estas korspegulo de l' nobla kaj virta animo.

Muzikanto

Laŭ germana popolkanto – oni gestas la muzikadon
je ĉiu instrumento



Mi estas muzikanto, bona ludanto,
mi estas muzikanto, bona ludanto,
mi scipovas ludi, mi scipovas ludi,
la gitaron, la gitaron: Gita-gita, gita-gita, gita-gita, gita-gita,
Gita-gita, gita-gita, gita-gita, gitaron.

... la pianon: Pia-pia, pia-pia, pia-pia, pia-pia,
Pia-pia, pia-pia, pia-pia, pianon.

... violonon: Vio-vio, vio-vio, vio-vio, vio-vio,
Vio-vio, vio-vio, vio-violonon.

... la trumpeton: Trumpe-trumpe, trumpe-...-trumpe,
Trumpe-trumpe, trumpe-...-trumpeton.

... la tamburon: Tambu-tambu, tambu-tambu, ...-tambu,
Tambu-tambu, tambu-tambu, ...tamburon.

... ĉiujn instrumentojn: Gita-gita, pia-pia, vio-vio,trumpe-trumpe,
Gita-gita, pia-pia, vio-trumpe, tamburon.

Mia korpo

Mi havas du manojn, mi havas dek fingrojn.
Skuu la du manojn, rulu la dek fingrojn, streĉu, streĉu ilin ĝoje.

Mi havas du ŝultrojn, mi havas du brakojn.
Skuu la du ŝultrojn, rulu la du brakojn, streĉu, streĉu ilin ĝoje.

Mi havas du genuojn, mi havas du kruojn.
Skuu la du genuojn, rulu la du kruojn, streĉu, streĉu ilin ĝoje.

Mi havas unu korpon, unu belan korpon.
Skuu la korpon, rulu belan korpon, streĉu, streĉu ĝin ĝoje.

Vivu la stel'!

El la Franca: "Vive l'amour"

Plenigu la glason, ho ĉiu bonul'! Vivu la verda stel'!
Kaj kantu la homoj el ĉiu angul'! Vivul la verda stel'!



Refreno: Ho, vivu la, vivu la, vivu la stel'!
Vivu la, vivu la, vivu la stel'!
Vivu la stel'!
Vivu la stel'!
Vivu la verda stel'!

Plenigu la glason kaj tostu kun ni! Vivu la verda stel'!
La lingvo kreita por ĉiu naci'! Vivu la verda stel'!

Per voĉoj de nia kumbatalantar'! Vivu la verda stel'!
Resonu la voĉo sur tero kaj mar'! Vivu la verda stel'!


Jen via mondo!

Refreno: Jen via mondo, jen nia mondo,
kun monta neĝo kaj mara ondo,
de la tropikoj ĝis la polusoj:
jen vasta mond' por ĉiuj ni!

Kiam mi iris sur voj' sen celo,
jen supre brilis blua ĉielo,
kaj orregalo ŝajnis greno valo:
jen vasta mond' por ĉiuj ni!

Vagante, spurojn mi sekvis lerta,
kaj min turmentis soif' dezerta,
dum mi sopiris, iu voĉo diris:
jen vasta mond' por ĉiuj ni!

Mi la okulojn ŝirmis per mano,
kaj mi vidis ondojn de oceano,
la suno dronis kaj voĉo sonis:
jen vasta mond' por ĉiuj ni!



Al la fontano klara

El la franca, Tureno, 17a jarcento: "à la claire fontaine"

Al la fontano klara iris mi pro inklin'
ĝi estis tiel pura, ke tuj mi banis min.

Refreno: Mi jam delonge vin amas,
ne plu mi forgesos vin.

Ĝi estis tiel pura, ke tuj mi banis min.
Sub foliar' de kverko jen mi sekigis min.

Sub foliar' de kverko jen mi sekigis min.
Sur la plej alta branĉo kantis najtingalin'.

Sur la plej alta branĉo kantis najtingalin'.
Kantu, birdeto, kantu! Gajas al vi l'anim'.

Kantu, birdeto, kantu! Gajas al vi l'anim'.
Ridemas via koro, ploremas mia sin'.

Ridemas via koro, ploremas mia sin'.
Mia amiko Petro, Petro forlasis min!

Mia amiko Petro, Petro forlasis min!
Ĉar mi al li rifuzis rozon, pro ama tim'.

Ĉar mi al li rifuzis rozon, pro ama tim'.
Se nur la rozo estus plu en rozuja sin'.

Se nur la rozo estus plu en rozuja sin'.
Kaj se l'amiko kara ankoraŭ amus min!

Dek boteloj

Vice staras 10 infanoj. Je ĉiu vorto 'falas' unu infano teren. Fine ĉiuj infanoj kuŝas.

Dek boteloj pendas de la mur',
sed se akcidente falas unu nur,
tiam naŭ boteloj pendas de la mur'.

Naŭ boteloj ...

...

Unu botelo pendas de la mur'
sed se akcidente falas unu nur,
tiam nur odoro restas ĉe la mur'.

En mia eta pomo

El la germana «in meinem kleinen Apfel»



En mia eta pomo amuziĝas ĉiu hom'
tie enas kvin ĉambretoj, preskaŭ kiel el dom'.

En ĉiu ĉambro loĝas du kernoj nigraj nun,
ili kuŝas en la lito kaj sonĝas pri la sun'.

Ili sonĝas daŭre pluen plej belan sonĝon ĉi,
kiel baldaŭ ilin semos infano kara vi.

**Katoj, katoj**

El la ĉeĥa

Katoj, katoj, kiun lingvon vi parolas?
Katoj, katoj, kion diras vi?
Mjaŭ, mjaŭ, mjaŭ, ...

Hundoj ... ŭaf
Ŝafoj ... be
Kaproj ... mek

Bovoj ... mu
Tigroj ... groŭ
Muŝoj ... zum

Serpentoj ... sss
Fiŝoj ... b
(kiel fiŝa elspirado)

Ĉu brasikon plantas vi?

El la franca: "Savez-vous planter les choux?"

Ĉu brasikon plantas vi,
laŭ la modo, laŭ la modo?
Ĉu brasikon plantas vi,
laŭ la modo kiel ni?

Ni ĝin plantas per piedoj,
laŭ la modo, laŭ la modo,
ni ĝin plantas per piedoj,
laŭ la modo tie ĉi!

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per genuoj, ...

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per kubutoj, ...

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per la ŝultroj, ...

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per la kolo, ...

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per la kapo, ...

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per la kapo, ...

Ĉu brasikon ...?
Ni ĝin plantas per ...

Ĉu karotojn plantas vi
per la nazo, per la nazo?
Ĉu karotojn plantas vi
per la nazo, kiel ni?

Ne, ĉar ilin tie ĉi
per la manoj, per la manoj
ne, ĉar ilin tie ĉi
per la manoj semas ni.

Ĉu dum tago dormas vi
sur la seĝo, sur la seĝo?
Ĉu dum tago dormas vi
sur la seĝo, kiel ni?

Ne, dumnokte dormas ni
en la lito, en la lito.
Ne, dumnokte dormas ni
en la lito, kiel vi.

Ĉu hodiaŭ ploras vi
dum kunveno, dum kunveno?
Ĉu hodiaŭ ploras vi
dum kunveno tiu ĉi?

Ho, ne! Kanti volas ni,
geamikoj, geamikoj.
Ho, ne! Kanti volas ni,
kanti gaje, kiel vi!

**Frato Ĵako**

El la franca: "Frère Jacques"

Frato Ĵako, frato Ĵako,
levu vin, levu vin!
Jen la sonorilo, jen la sonorilo:
bim bam bom, bim bam bom!

Frato Ĵako, frato Ĵako,
lavu vin, lavu vin!
Metu vian veston, metu vian veston:
bim bam bom, bim bam bom!

Frato Ĵako, frato Ĵako,
kuru vi, kuru vi,
tuj al la lernejo, tuj al la lernejo:
bim bam bom, bim bam bom!

Per okuloj, du okuloj,
Vidas mi, vidas mi.
Vidas per okuloj, ... (bis)
Vidas, jes. Vidas, jes.

Per oreloj ... aŭdas mi.
Per la nazo ... flaras mi.
Per la buŝo ... kantas mi.
Per la kapo ... jesas mi.

Per la manoj ... klakas mi.
Per la koksoj ... dancas mi.
Per la gamboj ... marŝas mi.
Per piedoj ... stamfas mi.

Lundon ĉe mi

El la franca: "Lundi matin"

Lundon ĉe mi,
la reĝ', reĝin' kaj eta princo
frapis al la pord' por premi mian manon.
Pro mia forest' diris la princet':
Ni reiru do, kaj ĝis reven' je mard'!



Mardon ĉe mi, ... je merkred'!
Merkredon ĉe mi, ... je ĵaud'!
Ĵaŭdon ĉe mi, ... je vendred'!
Vendredon ĉe mi, ... je sabat'!
Sabaton ĉe mi, ... je dimanĉ'!
Dimanĉon ĉe mi, ... je lund'!

Pri koloroj

El la germana

Blankaj estas ĉiuj miaj vestoj, blankas ĉio, kion havas mi,
al mi tre plaĉas ĉio, kio blankas, ĉar mia kara estas muelisto.

Nigraj estas ĉiuj miaj vestoj, nigras ĉio, kion havas mi,
al mi tre plaĉas ĉio, kio nigras, ĉar mia kara estas kamentubisto.

Bluaj estas ĉiuj miaj vestoj, bluas ĉio, kion havas mi,
al mi tre plaĉas ĉio, kio bluas, ĉar mia kara estas ja maristo.

Verdaj estas ĉiuj miaj vestoj, verdas ĉio, kion havas mi,
al mi tre plaĉas ĉio, kio verdas, ĉar mia kara estas ĝardenisto.

...

Buntaj estas ĉiuj miaj vestoj, buntas ĉio, kion havas mi,
al mi tre plaĉas ĉio, kio buntas, ĉar mia kara estas ja pentristo.

Erinaco

Silezia popolokanto



Nia avo foje trovis erinacon en ĝarden'
kaj li kaŝis ĝin sub tukon sur la benko ĉe kamen'.

Refreno: Jes, jes, estas vero, jes, jes, estas ver'
se ne kredas vi, do venu konvinkiĝi pri l' afer'.

Sen atent' sur erinacon eksidiĝas la onklin',
kiel la dragon' el selo salte ŝi elpafis sin.

En vilaĝo nune ŝvebas mokaj miroj pri sagac'
de l' onklino, kiu provis rajdi sur la erinac'.

Sur la pont' d' Avinjon'

El la franca: "sur le pont d'Avignon"

Refreno: Sur la pont' d' Avinjon' oni dancas, oni dancas.
Sur la pont' d' Avinjon' oni dancas en la rond'.

Tiel faras la junul' – estas vere li ĉarmul';
La fraŭlin' adoras lin – ne plu povas regi sin.

La avinjo sur la pont' – ankaŭ dancas en la rond';
Kaj la fiŝoj sub la pont' – dancas same en la rond'.

Tiel faras la soldat' – kaj salutas ĉe l' parad',
Hundoj, katoj, eĉ azen' – estas ankaŭ ĉe l' aren'.

Pirueto, ternukseto

Tradukis Béatrice Jouault el la franca: "pirouette cacahuette"

Iam estis ja viret' – pirueto, ternukseto, iam estis ja viret'
vivanta en strangege dom', vivanta en strangege dom'.

Tiu estis el karton'. – pirueto, ternukseto, ...
kaj la ŝtupar' ja el paper', ...

Se soriros iu ajn – pirueto, ternukseto, ...
rompiĝus tuj lia nazpint', ...



Grimpis ĝin leterportist' ... rompiĝis do lia nazpint', ...

Rekudriĝis lia naz' ... per orkolora ĉi faden', ...

Tuj rompiĝis la faden' ... kaj flugis for lia nazpint', ...

Reakci-aviadil' ... tiun nazpinton' kaptis re, ...

Nun finiĝas l'anekdot' ... gekarular' aplaŭdu do, ...

Onklino el Maroko

Laŭ la germana « von den blauen Bergen kommen wir »

La onklino el Maroko, venos ŝi - hip-hop. (bis)
La onklino el Maroko, la onklino el Maroko,
La onklino el Maroko, venos ŝi - hip-hop.

Refreno: Kantu: jaja jipi jipi je - hip-hop. (bis)
Kantu: jaja jipi jipi jaja jipi jipi,
jaja jipi jipi je - hip-hop.

Kaj ŝi rajdos sur kamelo, venos ŝi - hopel-hopel.

Kaj ŝi pafos per pistoloj, venos ŝi - pif-paf...

Kaj eksonos sonoriloj, venos ŝi - bim-bam...

Kaj ni kantos kanoneton, venos ŝi - la-la...

Kaj ni buĉos la porketon, venos ŝi - riĉ-raĉ...

Ĵus alvenis nur letero, sed ne ŝi - oooooo...

Jen ŝi iras

Laŭ usona popolokanto

Jen ŝi iras laŭ montaro dum alven', (bis)
Jen ŝi iras laŭ montaro, iras laŭ montaro,
Jen ŝi iras laŭ montaro dum alven'.

Refreno: Sonas ja-ja-jupi-jupi-ja, (bis)
Sonas ja-ja-jupi, ja-ja-jupi,
Sonas ja-ja-jupi-jupi-ja.

Jen ŝi rajdas sur ĉevalo dum alven'...

Jen ŝi havas kaki-veston dum alven'...

Ruĝan kokon vi mortigu por regal'...

Liberas la pens'

El la germana: "Die Gedanken sind frei"

La penso de l' hom' libera ja estas,
Samkiel fantom' kaŝita ĝi restas.
Ĝin hom' ne divenos, nek ĉirkaŭkatenos,
do restas laŭ senc', ke liberas la pens'!

Mi pensas laŭ plezur', nenie ĝin citas,
sekrete mi nur pri ĉio meditas.
Dezirojn – vi sciu, malhelpas neniuj,
do restas laŭ senc', ke liberas la pens'!

Se iam kaptos min karceri malhela,
deklaros mi ĝin agado sencela,
la pensoj trapasos, la murojn frakasos,
per granda potenc', ĉar liberas la pens'!

Do tiel nun ĉe fin' mi zorgojn forpelas,
turmentas ili min, vivĝojon forŝtelas!
Mi povas sentime, ĝojadi anime
kaj pensi de komenc', ja liberas la pens'!

Se vi sentas nun kontenton

Se vi sentas nun kontenton, plaŭdu tuj, (bis)
Se vi sentas nun kontenton, por elmontri tiun senton,
Se vi sentas nun kontenton, plaŭdu tuj.

Batu tuj / Stamfu tuj / Saltu tuj / Kriu tuj hura / Faru ĉion

Himno de ĝojo

Beethoven – Zamenhof, el la germana: "Freude, schöner Götterfunken"

Ĝojo, bela dia lumo
vi, filino de l' ĉiel',
al vi venas nun adeptoj
por saluti kun fidel'.

Vi mirakle ligas kune
dividitojn de la sort'.
Fratoj estos ĉiuj homoj
kiujn tuŝas via fort'.

Nia lingvo, Esperanto,
donas helpon en la mond'.
Ho, kreskadu la anaro
de pacema, granda rond'.

Kaj fermiĝu per kompreno
de l' malpaca ĉefa front',
nia lingvo Esperanto
povas servi kiel pont'.

Kampanarino

El la hispana "Guantanamera"

Refreno: Kampanarino, belega kampanarino.
Kampanarino, belega kampanarino.

De kie kreskas la palmoj
mi venas homo sincera
por kanti simplajn korkantojn
al nia mondo mizera.



La kantoj spiras helverdon
kaj spiras ardan brulruĝon
kaj kiel cervo vundita
en montoj serĉas rifuĝon.

Mi disdividas la sorton
kun la mizera homaro,
ĉar tiu monta torento
ĝojigas min pli ol maro.